*Emmanuel DESBRIERES*
*5 minuta parolado*
*Strasburgo la 9an de majo 2024.*

# ***Lernejaj interŝanĝoj, paco kaj Esperanto***

*Por ne tro devojogo mi preparis tekston. Do mi legu ĝin.*

*«Le plus beau métier*
*est le métier d'unir les hommes".*
Antoine de Saint Exupéry (1900-1944)

*"**La plej bela metio***
***estas la tasko unuigi homojn**".*

*Sed kiel fari konkrete ? Miaskale ?*

*Certe ekzistas multaj manieroj.*
*Mi nur parolos pri nia sperto.*

*Unue mi rapide prezentos kiuj ni estas.*
*Poste mi parolos pri niaj etaj agadoj.*

*A- rapida prezento*

*A1- Eta liceo*

*Mi estas instruisto pri geografio, historio kaj civitana edukado. Mi instruas de multaj jaroj en eta liceo (gimnazio).*
*Imagu ke en mia liceo nur estas proksimume 300 gelernantoj inter 15 kaj 18.*
*En la sama lernejo staras ankaŭ mezlernejo, kie plie lernas proksimume 400 pli junaj gelernantoj.*

*La liceo estas nomata Victor CONSIDERANT.*
*Victor CONSIDERANT naskiĝis en nia urbo. Li estis sociala utopisto dum la deknaŭa jarcento. Li famiĝis kiel "inĝeniero" de Charles FOURIER. Victor CONSIDERANT provis realigi la ideojn de FOURIER kaj kreis "falansteron", komuna loĝado, en Dallas (Usono).*
*Do ne en sia naskiĝa urbo sed ... en Ameriko.*

*=> Do eta liceo sed kun granda nomo*
*ligita al projekto*
*por konstrui konkrete harmonian mondon.*

*A2- Eta urbo*

*La liceo situas en Salins-les-Bains, kiu estas urbeto en la franca Ĵuraso. Ni estas najbaroj de Svislando. La landlimon oni veturile atingas post unu horo.*

*La nomo de la urbo "Salins" devenas de la vorto "salo". Tie oni eltiris salon dum proksimume 1 200 jaroj. Salins estis industria urbo kaj pro tio nun vizitindas subteran "katedralon". Tie oni pumpis salitan akvon el la profundaj geologiaj tavoloj. Poste oni varmigis salitan akvon kaj vaporigante akvon oni kolektis la blankan oron : salo.*

*Pro tio la Granda Salfarejo de Salins estas de la jaro 2009 listigita kiel monda heredaĵo ĉe UNESKO.*

*=> Do eta urbo sed kun monda agnosko.*

## *B- Etaj agadoj por paco*

### *B1- Esperanto ateliero*

*De la jaro 2017 Esperanto-ateliero funkcias en la liceo.*

*Tiu ateliero tuj serĉis rilati kaj korespondi kun aliaj gejunuloj, kiuj lernas esperanton en aliaj landoj.*

*De la komenco ni ĉefe korespondas kun la gelernantoj de Peter GRBEC, kiu instruas en Koper (Slovenio). Ni organizis kelkajn retkunvenojn kun ili.*

*Eĉ en nia liceo la unua internacia retkunveno okazis en Esperanto ;-)*

*Ni ankaŭ korespondas kun la gelernantoj de Fabián JIMENEZ kaj Belen CAMACHO en Malaga (Hispanio).*

*Ni sendis sinprezentajn filmetojn al la ĉinaj gelernantoj de Alessandra MADELLA kaj ni ricevis filmojn  kie ili sinprezentis.*

*=> Do eta ateliero sed kun eŭropa kaj monda malfermo.*

*B2- Etaj vojaĝoj*

*Kompreneble, korespondi kaj retkunveni ne sufiĉas. La gelernantoj deziras pli konkretajn kontaktojn. Do ni vizitis Slovenion en 2019, 2023 kaj 2024. Proksimume 150 gelernantoj partoprenis. Tie ili malkovris alian lernejan sistemon kaj konkrete renkontis la Slovenojn. Peter GRBEC organizis pedagogian momenton : Duope franca lernanto kunlaboris kun slovena lernanto por konstrui roboton per Lego-brikoj. Kaj dum la korbo-pilka matĉo oni ne kontraŭigis Slovenion kaj Francion. Sed en ĉiu teamo estis Francoj kaj Slovenoj, knabinoj kaj knaboj. Tiel ili internacie ludis. Kaj ili ĝuis tion. Eĉ pli ol dum matĉo en kiuj batallis nacioj.*

*Plie la gelernantoj laboris pri la ideo de "limo" Vizitante eŭropan regionon, kie la difino de la limoj estis malfacila. Trapasante limojn, rigardante historiajn mapojn ili spertis kiel homoj partigis landojn.Tiel la gelernantoj komprenis ke landlimoj tro ofte rezultas pro militoj kaj ne estas "naturaj".*

*Por klare montri tiun fakton la vojaĝ-programo ĉiam enhavis elektitajn vizitojn. Ekzemple en 2023 ni vizitis la groton de Ŝcokjan. Vidu : la rivero (Rijeka) fontas en Kroatio, fluas tra Slovenio, en Ŝcokjan subteriĝas en gigantajn grotojn, kaj reaperas nun en Italio apud Triesto.*
*Rivero ne konas landlimojn !*
*=> Do etaj vojaĝoj :2-3 tagojn surloke sed granda ambicio.*

*B3 – Eta retkunveno dum militoj*

*Antaŭ daŭrigi mi deziras scii ĉu ĉeestas homoj el Ukrainio...*

*La gelernantoj kaj mi deziris fari pli :*

*ekzemple inviti Ukrainojn !*

*Sed kiam ekis la militon en Ukrainio la 24an de februaro 2022 ni estis tiel ŝokitaj ke ni rapide elturniĝis. Dum tiu kunteksto niaj pensoj iris al la viktimoj. Paralele loĝantoj de nia urbeto organizis sin por sendi helpon kaj akcepti rifuĝantojn.*

*Niafkanke :* ***Se Esperanto estas paca lingvo ni devu uzi ĝin por paco !***

*Pli rapide por mi estis sendi tujan mesaĝon al Elena NADIKOVA, sekretario de ILEI (tutmonda asocio de la geinstruistoj pri Esperanto). Elena loĝas en Ĉeboksari en Rusio.*

*Kaj ni realigis retkunvenon la 5an de majo inter la francaj kaj la rusaj gelernantoj pri Esperanto de Elena. Evidentiĝis ke la junuloj similas. Rusaj gelernantoj same studas, kantas, dancas, ludas, revas ...*

*Samtempe kunĉeestis lernantoj de Joël MUHIRE en la regiono Kivu en Kongo. Alia regiono de la mondo kie senĉesa milito ruinigas homojn de jaroj... Ĉeestis ankaŭ la ILEI-Prezidanto : Ahmad Reza MAMDUHI en Teherano en Irano.*

*=> Do eta sperto super la landlimoj kaj eĉ la militoj.*

## Por fini

jen la poemo, kiun 40 francaj gelernantoj legis sur la ĉefa placo de Ljubljana. Estas poemo verkita de la slovena poeto, France PREŠEREN (1800-1849). Tiu poemo estas la nacia himno de Slovenio («Slovenujo» kiel preferas diri Peter).
Ĉu ĉeestas Slovenoj ?

| en la slovena | Esperanto "La Toasto» | en la franca «le toast» |
|---|---|---|
| Žive naj vsi narodi<br>Ki hrepene dočakat' dan,<br>Da koder sonce hodi<br>Prepir iz sveta bo pregnan.<br><br>Da rojak<br>Prost bo vsak,<br>Ne vrag, le sosed bo mejak!<br><br>Da rojak<br>Prost bo vsak,<br>Ne vrag, le sosed bo…<br>Ne vrag, le sosed bo mejak! | Ke vivu ĉiuj gentoj<br>eksopirantaj pri la hor',<br>ke trans la kontinentoj<br>disput' el mondo estos for,<br>en liber'<br>ne barbar',<br>ĉe limo estu nur najbar'! | Vivent tous les peuples<br>Qui aspirent à voir le jour,<br>Où le soleil dansant sa ronde<br>N'éclairera que de l'amour.<br><br>Où tout citoyen<br>Sera libre enfin,<br>En paix avec tous ses voisins!<br><br>Où tout citoyen<br>Sera libre enfin,<br>En paix avec tous ses …<br>En paix avec tous ses voisins ! |

Grava mesaĝo por furioza kaj milita nuna periodo, ĉu ne ?

*Eta liceo, eta urbo, etaj agadoj por paco*...